

# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

## Monumento de Hasegaŭa Teru Inaŭgurita

Doi Ĉieko



*Monumento de Hasegaŭa Teru, en la templo Hannja-ĝi en la urbo Nara, memore al ŝia vizito al la templo, kie ŝi kun la amikino ĵuris sin dediĉi por la paco en la mondo!*

La 30a de aprilo estas memortago, en kiu Hasegaŭa Teru kun ŝia kolegino Nagato Jasu vizitis la templon, kie ambaŭ ĵuris sin dediĉi por batali por la paco. Tio estis en 1932. Nun estas jam konate por japanaj

esperantistoj kaj ankaŭ ne-esperantistoj, ke Hasegaŭa Teru dediĉis sin esti batalanto por la paco inter Japanio kaj Ĉinio.

Sed tiu ago estis malfavora al la tiama japana registaro, kaj ambaŭ estis arestitaj de la polico kaj forpelitaj de la Alta Porvirina Pedagogia Kolegio en Nara. Ambaŭ estis devigitaj reiri al siaj hejmlokoj: Teru al Tokio kaj Nagato Jasu al Nagojo.

Poste Teru laboris en Japana Esperanto-Instituto kiel volontulo, kaj konatiĝis kun ĉina studento nomata Liu Ren loĝanta kaj studanta en Tokio. Li esperantistiĝis en Japanio. Teru kaj Liu Ren enamiĝis kaj geedziĝis aŭtune de 1936. Estis tempo, en kiu Japanio kaj Ĉinio estis batalantaj inter si, kaj Liu Ren reiris al Ĉinio en marto de

1937. Kaj tuj poste en aprilo ankaŭ Teru sekrete ekveturis de la haveno de Jokohamo al Ĉinio. En julio de la sama jaro reale komenciĝis la batalo inter Japanio kaj Ĉinio.

Teru kaj Liu Ren loĝis en Ŝanhajo, Guangzhou, Honkongo, kaj Hankou, kie en 1938 ŝi laboris per Esperanto en la Internacia Fako de Guangdong, sed tuj poste ŝi estis forpelita al Honkongo, kaj tuj poste ŝin sekvis la edzo. Poste dank' al la helpo de Guo Moruo (konata en Japanio kiel 郭沫若) kaj Kaĝi Ŭataru ili povis iri al Hankou, kaj poste al Chongqing. En ambaŭ urboj ŝi laboris kiel anoncistino. Ŝi alvokis japanajn soldatojn, kiuj militbalalis en Ĉinio, "Viaj malamikoj ne estas ĉi tie; ne verŝu vane sangon!" Tiam la japana registaro eksciis, ke la anoncistino estas Hasegaŭa Teru, kiu parolis al japanaj soldatoj. Tio estis informita per radio en Japanio, kaj ŝiaj familianoj en Japanio estis persekutataj.

En 1941 naskiĝis ilia filo nomata Liu Xing [ŝing]. En 1945 ŝia verko "En Ĉinio Batalanta" estis eldonita. En 1946 naskiĝis ilia filino nomata Liu Xiaolan [ŝiaolan]. Ilia patrino (Hasegaŭa Teru) mortis en 1947 kaj tuj poste mortis ankaŭ ilia patro Liu Ren. La postlasitaj du gefiloj kreskis en la domo de orfoj, sub la prizorgo de la ŝtato. Kvankam ili estis infanoj sen la gepatroj, ili ricevis altan edukadon, ĉar ili estis gefiloj de la gepatroj aktivaj por la ŝtato.

Tamen ili ne sciis pri siaj gepatroj. La filo Liu Xing sciis laŭ la paroloj de sia onklo, ke ilia avo estis oficisto de Tokio, kaj do li skribis japanlingvan leteron al la publikaj oficejoj en Tokio; ĝi atingis post kelka tempo al la ĝusta oficejo, kaj al la frato de Teru kaj ankaŭ al la

fratino loĝanta en Numata, norda urbo de la gubernio Gunma. La onklino, vidvino de la esperantisto Nisimura Masao, nun edziniĝinta al s-ro Ozawa, havis kontakton kun esperantistoj en Japanio, precipe en Kansajo. Kaj en 1979 la du gefiloj de Teru povis viziti Japanion kaj partopreni en la 61a Japana Esperanto-Kongreso en la urbo Kobeo. Poste iliaj aferoj fariĝis la temo de televida dramo, en kiu la aktorino Kurihara Komaki ludis la rolon de Teru. Liu Xing, la filo de Teru, studis en Japanio sed iom poste li mortis pro kancero. Ankaŭ la filino de Teru, Liu Xiaolan, studis en Japanio kaj havis kontaktojn de homoj, kiuj prizorgis ŝian restadon en Japanio. Poste ŝi ricevis japanan ŝtatanecon kaj ekloĝis en Japanio kun la edzo kaj filino. Pri ŝia vivo oni eldonis libron kaj la vivo estis subtenata de multaj homoj, neesperantistoj kaj esperantistoj. En 2016 ankaŭ mi povis renkontiĝi kun ŝi en la universitato de Dooŝiŝa, kie ŝi instruis la ĉinan lingvon, sed tuj poste ŝi kun la familianoj forlasis Japanion kaj ekloĝis en Kanado ĉe sia filino.

Kaj nun en ĉi-jara kunsido por Malfermi la Monumenton de Hasegaŭa Teru, en la templo Hannja-ĵi, Nara, ŝi venis de Kanado. Estis tre ĝoje denove renkontiĝi kun ŝi en Nara okaze de ĉi tiu evento.

Mi havis ankaŭ renkontiĝon kun alia sinjorino, s-ino Hiracuka Masako, kiu estas la filino de Nagato Jasu, kun kiu Teru eklernis Esperanton en studenta vivo en Nara, kaj ŝi same kiel Teru, estis forpelita de la kolegio.

Kiam nia Esperanto-Rondo en Jokohamo havis publikan kunsidon pri Hasegaŭa Teru en la Centro de Civitanaj Aktivadoj en Kanagavo en junio 2019, venis gasto, s-ino Hiracuka Masako, kiu estas filino de Nagato Jasu, kun kiu Teru ĵuris lerni Esperanton. S-ino Hiracuka nun loĝanta en Jokohamo ĉeestis en la kunsido en Hannja-ĵi en Nara.

Nu, pri la evento en la templo Hannja-ĵi, en la 30a de aprilo, ĉi-jare. Ni legu la Ĵurnalon de Nara en la unua de majo:

**En la templo Hannja-ĵi okazis Senvualigo de la Memor-Ŝtono por Heredi la Volon kontraŭ la Milito, memore al la vizito de Hasegaŭa Teru al la templo en 1932.**

Hasegaŭa Teru (1912~1947), en studenta tempo en Porvirina Kolegio de Nara, eklernis Esperanton, la Internacian help-lingvon kaj apelaciis kontraŭ militoj, kaj en la 30a de aprilo antaŭ 91 jaroj ŝi kun la amikino Nagato Jasu vizitis la templon Hannja-ĵi. En tiu templo La Societo en Nara por Manifestacii Agojn de Hasegaŭa Teru okazigis la malfermon de la memorŝtono.

Starigi la memorŝtonon planis en 2017 tiu Societo, kaj necesis ses jaroj por starigi la Memorŝtonon; la societo petis gravuristinon Sakaguĉi Kijomi fari tion. Ankaŭ ŝi estis iama studentino de la kolegio. Ŝi faris la gravuraĵon, kiun ŝi nomis “Brulas Kerioj” kaj faris el blanka granito laŭ la imago al flavaj floroj de kerio. Per la materialoj ŝi esprimis ardan kaj profundan koron de Teru. En la ceremonio de la montrado de la monumento ŝi salutis: “La deziro al la paco de Teru estas enmetita en la florantaj flavaj floroj de kerioj”.

En la ceremonio de la malfermo de la memorŝtono, salutis i.a. la ĉefbonzo de la templo kaj la filino de Teru, loĝanta en Kanado, kaj ĉiuj ĉeestintoj donacis la flavajn keriajn florojn kaj gratulis la elfaron de la monumento.

En la ceremonio ĉeestis ĉ. 100 personoj, kiuj celebris la malfermon de la monumento. Koncernantoj parolis pri Hasegaŭa Teru, ankaŭ mi estis devigita paroli pri Hasegaŭa Teru kaj Esperanto, kaj ankaŭ niaj agadoj de Esperanto en nia studenta tempo kaj ankaŭ aferoj de Teru post la studenta vivo en Jokohamo ktp.

Doi Ĉieko, la tradukinto de la frazoj de la monumento en Esperanton, kaj kelkaj aliaj ricevis dankon de la organizanto de la aranĝo.



## eseoj

## Pizo

Itabaŝi Micuko

Lastajare en printempo mi trovis plantidojn de pizoj senzorge metitaj antaŭ florvendejo. Probable sezono por planti ilin estis forpasonta. Mi memoris guston de juna pizo, kiun mia patrino donis al ni infanoj kiel manĝaĵetojn inter taga kaj vespera manĝoj.

Mia infaneco estis post la dua mondomilito. Mankis ĉiu materialo, ne nur vestaĵo, sed ankaŭ nutraĵo. Mia patrino plantis kelkajn legomojn en legomoĝardenon. Ili estis frago, melono, akvomelono, terpomo, batato, maizo, sojfabo, pizo, k.t.p. Ŝi donis ilin al ni infanoj. Ŝi rikoltis maizon, sojfabon kaj pizon ankoraŭ ne sufiĉe maturajn. Ni ŝatis verdajn sojfabon kaj pizon, kaj ĝuis ties guston ĝissate.

Kreskinte mi vivas en urbo. Mi jam ne povis preni tiel freŝajn legomojn, precipe pizon. Vidinte pizajn plantidojn, mi pensis, ke mi povos kreskigi ilin en plantujo, aĉetis ilin por modera prezo kaj plantis en du plantujojn. La plantoj bone kreskis kaj ekhavis multe da verdaj guŝoj en frua somero. Ne nur mi sola, sed kun miaj nepoj, kiuj venis en mian hejmon, rikoltis ilin, kaj broginte kunkune ĝuis la gustojn.

En interreto mi sciis, ke oni povas semi pizon aŭtune kaj rikolti printempe. Mi aĉetis la semojn kaj semis ilin en etajn plastajn plantujojn en fino de oktobro. Baldaŭ ili ĝermis kaj kreskis. Tamen ili ne povos travivi vintron en tiuj etaj ujoj. Mi transplantis ilin en angulo de korto en novembro kaj donis stangojn al ili, por ke ili subtenu siajn malfortajn tigojn. Venis vintro kaj ili tremis en norda vento. Mi ĉirkaŭigis ilin per plastaj tukoj laŭ stangoj. Januare ili ekhavis blankajn florojn.

En la fino de marto mi unuafoje rikoltis kelkdekon da guŝoj kaj broginte manĝis ilin. Ili estis tre dolĉaj.

Mia memoro al pizo flugas al fama romano "Kiel Akvo de L' Rivero". En ĝi francoj manĝis krudajn pizojn. Tiu afero mirigis min kaj miaj kamaradoj, kiuj kune legis la verkon. Kiam mi partoprenis en UK, mi demandis al eŭropanoj, ĉu ili manĝas junan pizon ne kuirinte, kaj kelkaj el ili respondis al mi jese. Jes, tio estas ne mirinda afero, ĉar ĉiu havas siajn kulturon kaj kutimon. Ni japanoj manĝas krudan ovon kaj alilandanoj miris pri tiu kutimo, kiam ili spertis tion en

hotelo de Japanio. Sed ial memoro pri kruda pizo en la romano kaj babilado de la kamaradoj restas en mi.

Mi volas iom tuŝi nian legado-kunsidon, ĉar ĝi estas granda parto de mia esperanta historio.

Pro malsano mi lasis laboron en 1990. Tiutempe mi gvidis kelkajn novajn e-istojn. Sed mi sentis, ke mia scio pri Esperanto ne sufiĉas. Mi forte deziris kiel eble plej multe lerni nian lingvon. Kaj mi telefonis al amikino Hirose Kanae, ke ni kune lernu Esperanton. Kaj de majo de tiu jaro ni komencis legadokunsidon kun ŝia amikino Cucumi Ĉisato. Nia kvara membro estis s-ino Morita Reiko (1918-01-27/2002-06-23). Antaŭ la dua mondomilito ŝi lernis Esperanton. Kiam ŝi estis lernanto de virina lernejo, en ŝia klaso estis filino de Toki Zenmaro, kiu estis fama literaturisto kaj utaisto. Kaj li estis ankaŭ fervora esperantisto. Li fariĝis estro de protektanto-asocio\*, amikiĝis kun lerneja direktoro, kaj instigis lin al Esperanto. Kiam ŝi avancis al la tria klaso, Esperanto-klubo estis fondita en ŝia lernejo, kaj ŝi lernis nian lingvon. Ŝi havis vere severan opinion al nia movado. Ni ofte estis skolditaj de ŝi pri nia fortomanko. Baldaŭ membroj fariĝis ok. Kiam s-ino Morita lasis nin, venis nova membro kaj la nombro ne ŝanĝiĝis. Kiam nia rondo decidis okazigi UK-on en Jokohamo, ni finis la kunsidon.

En la unua tempo de la kunveno estis plej malfacile trovi kunsidejon. Ĉiumonate ni serĉis ĉambron ĉe kelkaj publikaj domoj kaj laŭ loto depruntis ĝin. Kaj finfine oni permesis al ni uzi ĉambron en iu publika domo. Kaj la kunsido okazis du horojn en ĉiu ĵaŭdo. En la unua tempo ni elektis nian legomaterialon el 'Nova Esperanta Krestomatio'. Poste ni legis multe da verkoj. Mi jam forgesis, kiom da libroj ni legis kaj kioma libro estis "Kiel Akvo de L' Rivero". Sed mi notis en la libro, ke ni eklegis ĝin en la dekkvina de oktobro 1998, kaj finlegis en la dudekunua de decembro, 2000. Nome, ni bezonis pli ol du jarojn por legi unu romanon, sed neniam enuis.

Nia legomaniero estis: dividis paĝon al ĉiu, laŭvice raportis sian parton kaj interŝanĝis opiniojn al la raporto. Dum la tempo mi spertis, ke memlernado kaj kunlernado estas tre gravaj.

Pizo memorigas al mi ne nur mian patriron, kiu preskaŭ ĉiam gaje vivis eĉ en malfacila tempo, sed ankaŭ la verkon "Kiel Akvo de L' Rivero" kaj ĝojplenan kunsidon.

\*Oni ne komprenus la vorton "protektanto-asocio". La organizo similis al nuna gepatro-asocio. Tiutempe japana reĝimo estis nedemokrata, sed paternalisma. Virinoj kaj infanoj estis sub protekto de familia estro.

## Konvena servo

En la ĉiutaga vivo neatenditaj kaj etaj problemoj fojfoje okazas. Mi mem ne povas solvi, kaj trovi la utilan metodon. Kelkfoje tiuj aferoj frapis min ĝis nun. Antaŭe mi konsultis al najbaroj, kun kiuj mi bone komunikas. Tamen estas malfacile konsulti laŭtempe, kaj mi povus ĝeni ilin. Se mi senatente petus tiun, kiun mi hazarde trovis sur reto, mi eble pagus multe da mono nur por la unua vizito.

Bonŝance mi sciis, ke Akcia Kompanio Osaka Gaso (poste "Osaka Gaso") ofertas tre konvenan servon. Tio estas "Sumikata-purasu" (住み方プラス), kiu kovras larĝe niajn ĉiutagajn problemojn. Por uzi tiun servon ni devas havi kontrakton kun Osaka Gaso, kaj devas pagi 216 enojn (konsumimposto inkluzivata) ĉiumonate. Surbaze de tiu kontrakto, ni facile povas peti de Osaka Gaso pri solvo de problemoj: senpaga nur por la unua fojo. Sed, kiam la problemo ne estas solvata, ni devas peti fakulon. Ili helpas serĉi fakulon, aŭ montras la fakturon por ripari.

Mi fojfoje uzas tiun servon. Ĉar mi sola vivas kaj ne havas miajn familianojn ĉirkaŭe, ankaŭ mi ne scias al kiu mi devas konsulti. Mi unufoje telefonas al Osaka Gaso petante helpon. Post kiam ili certigis mian kontrakton, ili aranĝas la

unuan viziton al mia hejmo. Ekzemple mi uzis tiun servon jene.

1) Iutage subite aŭdiĝis stranga, ĝena kaj eta sono: mi ne konas la fonton de la sono.

Dungito de Osaka Gaso venis kaj tuj montris la solvon. La sono venis de la murhorloĝo. Mi estis tre surprizita kaj demandis, kial li facile trovis solvon. Li tuj diris, ke li fojfoje renkontis similajn aferojn ĝis nun.

2) Interŝanĝi baterion de murhorloĝo. Horloĝo pendas alte sur la muro, kaj estas tre danĝere por mi uzi ŝtupareton.

3) Malfunkcio de bideo-necesejo: malfunkciis la butono de "akvofluado-post-uzo".

En tiu okazo dungito de Osaka Gaso diris, ke tio estas ekster lia laboro, do petu de fakulo. Eĉ tiam li admonis min pri rimarkindaj punktoj en la okazo de sekva kontakto.

Kiam la problemo estis solvita, mi trankviliĝis, tamen aliflanke mi estas iomete honta pro mia bagatela peto. Sed, li diras, ke maljunuloj ofte uzas tiun servon, kaj li konsolis min. Preskaŭ ĉiuj problemoj estas solvataj en la unua vizito. Foje plia servo povas esti bezonata.

Post kelkaj tagoj ĉiam venas enketilo por koni mian kontenton. Post respondo de tiu enketo, eta donaco estas sendata kiel danko.

## el Tanjo (Ukrainio)

[daŭrigo de n-ro 384/aprilo 2023]

Kara Keiĉiro,  
jen ankoraŭ bona novaĵo: nia spektaklo ricevis Honoran diplomon "Premio de la jaro" de la Urbestro de Odessa, okaze de la Internacia Tago de Teatro la 27an de marto. Jen mi kun la direktoro de la teatro post la ceremonio.

Amike via,                      Auderskaja Tatjana Viktorovna



### Notico

Forpasis s-ro Aida Kiyoshi (91-jara) la 22an de aprilo 2023 pro malsano.